


SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://www.sat-esperanto.org/> *** retadreso: satesperanto@free.fr

*8-a de Marto
Internacia Ina
Tago*



Ivan Meštrović : patrino mamnutras sian idon

Marto 2005 76-a jaro, n-ro 3 (1197)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...

Karaj,
post la lasta, iom
griza numero, mi
renkontis nian
presiston kaj li
instruis al mi kiel
teknike prepari
la gazeton por
ke la koloroj estu pli belaj kaj pli
konformaj. Mi esperas ke la rezulto
jam nun estas videbla.
Ĉar estas ĉi-monate Internacia
Virina Tago, mi uzas la okazon
por deziri al niaj kamaradinoj kaj
legantinoj sukceson en nia komuna
batalo por la egaleco de du seksoj
en ĉiuj momentoj de la vivo. Mal-
granda parto de tiu ĉi numero estas
dediĉita al ili, kiuj eĉ en la 21-a
jarcento devas ankoraŭ batali por
siaj hominaj rajtoj. Ili sciuj ke iliaj
SAT-kamaradoj estas kun ili.



Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj
redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020
Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo:
+33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30;
de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster
la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020
39

BIC: PSSRFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G.
Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la
redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la
aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni
ne resendadas. La limdato de ricevo de manus-
kriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par : EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-
91480 Quincy-sous-Senart.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques
BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France
55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de
nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas
ĉiam la 10-a en la monato.




Por la egaleco
de ambaŭ
seksoj !

Kontraŭ la
seksa diskrimi-
nacio !

Ĉiuj kune por la homaj rajtoj !

KELKAJ KONATAJ VIRINOJ



Agatha Christie
Aung San Suu Kyi
Simone de Beauvoir
Camille Claudel
Greta Garbo
Marie Curie
Florence Nightingale
Rosa Luxemburg



ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

INOJ

Ili kantas kiam ili volas plori.

Ili ploras kiam ili estas ĝojaj kaj ridas kiam ili estas nervozaj. Ili batalas pro tiu al kiu ili kredas. Ili levas sin kontraŭ la maljuston. Ili ne konsideras “ne” kiel respondon, kiam ili kredas al pli bona solvo. Ili seniĝas de novaj ŝuoj por ke iliaj infanoj povu havi ilin. Ili akompanas siajn amikojn ĉe la kuracisto eĉ kiam temas pri malvarmumiĝo.

Ili amas sen kondiĉo. Ili ploras pro la sukceso de siaj infanoj kaj ĝojegas kiam iliaj amikoj sukcesas. Ili estas feliĉaj aŭdinte pri iu naskiĝo aŭ edziĝo.

Iliaj koroj rompiĝas ĉe perdo de amiko. Ili estas malesperaj perdante iun membron de la familio kaj tamen restas fortaj kiam oni kredas ilin ĉe la rando de iliaj fortoj. Ili scias ke ĉirkaŭbrako aŭ kiso povas mildigi la rompitan koron.

Virinoj aperas en ĉiuj grandecoj, koloroj kaj formoj. Ili uzos trajnon, aŭton, aviadilon, alvenos marŝante, kurante aŭ sendos mesaĝon nur por montri ke ili zorgas pri vi. La virina koro turnas la mondon! Virinoj faras multe pli ol nur naski la infanojn.

Ili kreas ĝojon kaj esperon. Ili generas kompaton kaj ideojn.

Ili estas morala subteno de sia familio kaj siaj amikoj. Virinoj havas multon por diri kaj multon por oferi.

simbola en tiuj jaroj.

La 8-an de Marto 1948 en Francio 100.000 virinoj defilas en Parizo de la Placo de la Respubliko ĝis la statuo de Jeanne d'Arc. En pluraj francaj urboj okazas samaj manifestacioj (5000 virinoj en Liono, 30.000 en Marsejlo).

La usonanoj provis alproprigi al si la daton de Ina Tago (Woman Day) sekve al iu virina striko de la **8-a de Marto 1857**. Tiu ĉi striko en Novjorko estas iu mito kiu neniam okazis, sed ili uzis tiun miton por elekti la daton de 8-a de marto).

1971, Svislando donas voĉdonrajton al virinoj.

La 8-an de Marto 1975 la Unuiĝintaj Nacioj komencas festi la Internacian Inan Tagon.

En Francio oni komencas festi oficiale la Internacian Inan Tagon, **8-a de marto**, ekde la jaro 1982 danke al la socialista registaro. Tamen oni devas konstati ke tiu tago ne plu havas protestan karakteron.

La 8-an de Marto 1986, en Ĉilio, la manifestacio estis perforte haltigita, kaj la saman tagon en Vaŝingtono 100.000 personoj manifestaciis kontraŭ la deziro de konservuloj nuligi la rajton aborti.

En 1988, en Sovetunio la **8-a de marto** estis elektita por lanĉi la unuan konkurson pri beleco....

La 8-an de marto 2001, estis inaŭgurita la unua TTT-paĝo pri la Ina Tago por noti ĉion kio estis farita kaj dirita pri la Inaj kondiĉoj.

La historio daŭras.....



INTERNACIA INA TAGO 8-A DE MARTO

Historio

La **8-an de Marto 1910** en Kopenhago, Konfederacio de socialistaj virinoj de ĉiuj landoj kreis tiun tagon kun celo propagandi la voĉdonrajton por virinoj.

La **8-an de Marto 1914**, virinoj postulas voĉdonrajton en Germanio, kiun ili akiros la 12-an de Novembro 1918.

La **23-an de Februaro 1917** (laŭ Gregoria kalendaro) kiu respondas al **8-a de Marto** (laŭ Julia kalendaro) en Sankta Peterburgo la laboristinoj manifestacias en la stratoj postulante panon kaj la revenon de iliaj edzoj el la militfronto.

Interese noti : ke la ordono de 21.a de Aprilo 1944, donas voĉdonrajton al francinoj, kiun ili uzos la unuan fojon la 20-an de Aprilo 1945 por la municipaj elektoj. (Tio estas unu jarcenton post la viroj, kiuj voĉdonas en Francio ekde la jaro 1848). La rajto esti elektitaj por la virinoj estas nur teoria kaj

ĈU VI PAGIS VIAN
KOTIZON?

VARBU AL SAT INTER
VIAJ KONATOJ !